

Laŭ la vetero kaj la libera tempo oni povos viziti :

- ĉu la Internacian Bildaro-Muzeon,
- ĉu la Forsteran Foiiron kiu malfermiĝos la saman tagon
- ĉu, por la interesatoj, konstruejon en kiu oni uzas la modernajn teknikajn rimedojn, kun la necesaj klarigoj de Sro-Bergerot.
- se la vetero ne estos tiel favora, oni povos aŭskulti sonbendojn pri la temo : "Ideoj pri Esperanto", (Sro Bergerot), kun poste debatoj inter la aŭskultantoj.
- se partoprenantoj deziras ion montri, kompreneble ili povos !

ORIENTFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Raporto pri agado (oktobro 1968 ĝis septembro 1969)

Post ŝajna revekiĝo la pasintan jaron, nia Federacio iom malpli brile vivis. Ĝia funkciado estis tamen kontentiga.

Ni havis 123 membrojn la pasintan jaron. Sed ĉar kelkaj havis la strangan ideon kotizi al G.E.E., UFE agnoskis por nia Federacio nur 119 membrojn ! Nun, ni varbis 25 novajn membrojn, sed ni perdis pli grandan nombron kaj ni restas nur 113 (1) kotizantoj. Ĉar 14 kotizis al GEE, ni oficiale apenaŭ atingos 100 anojn !...

Kvankam la grupo Strasbourg modeste anoncas nur 30 anojn, oni kalkulas 44 membrojn en Strasbourg kaj ĉirkaŭurbo inter la Federacianoj ! La Kultura Centro en Florivalo suferis gravajn perdojn sed la Junulara grupo en Thann estas ĉiam vigla kun 11 anoj. La La Esperanto-Societe Mulhouse posedas 4 anojn kaj ekzistas espero por nova grupo en Colmar.

La ĉefa aktiveco koncentriĝis ĉi-jare en Strasbourg por preparo de la 1a Komuna Franc-Germana Kongreso. La informado estis speciale vigla en Strasbourg, Guebwiller, Colmar, Mulhouse, Thann kaj Nancy. En Guebwiller okazis ekspozicio pri infandeseĝnaĵoj interŝanĝe kun grupo en Siberio, kaj longdaŭra ekspozicio pri Esperanto en montrofenestro.

Kursoj okazis en ĉiuj suprenomitaj urboj : En Strasbourg parola kurso kun 30 gelernantoj ; en Mulhouse kun 6 ; en Colmar kun 5 ; en Bar-le-Duc lerneja kurso en C.E.G. kun 50 gelernantoj ; ĉirkaŭ Thann : 3 lernantoj en Vieux-Thann, 6 en Bitschwiller, 6 en Roderen ; el Nancy, koresponda kurso varbis 23 gelernantojn.

La Federacia Kongreso okazis la 9an de Marto en Colmar. Ĝin filmis la regiona televido. Kelkaj ekskursoj kaj renkontiĝoj krome okazis, sed kun malgrava rezulto pro la malfavora vetero.

Kelkaj anoj de nia Federacio partoprenis dum la somero la diversajn Esperanto-aranĝojn internaciajn : Universala Kongreso, TEJO-Kongreso, Seminario por gvidantoj, Itala Kongreso, k.t.p.

La Sekretario : J.P.COLNOT.

(1) 116 laŭ lastaj decembraj ciferoj.

Kompletiga agadraporto (oktobro 69 ĝis 1a de marto 70)

Al la ĉi-supra raporto verkita por UFE en novembro, mi deziras aldoni la jenan ĝisdatan kompletigon :

Ni finis la jaron 69 kun 116 membroj kaj ĝis nun alvenis jam 70 kotizoj por 1970, el kiuj 11 novaj membroj. Kontentiga rezulto, ĉar malofte alvenis tiom da kotizoj tiel frue en la jaro ! La membronombro de la diversaj grupoj aŭ grupeblecoj (urboj kaj ilia ĉirkaŭurbo) estas la jena (1a cifero : 1969 - 2a cifero : ĝis nun por 1970) :
Strasbourg : 44-21 - NANCY : 14 - 8 ; THANN : 11 - 4 ; GUEBWILLER : 5 - 2 ; EPINAL : 4-4 ;
MULHOUSE : 4 - 2 ; BAR-le-DUC : 4 - 1 ; COLMAR : 1 - 4.

Kursoj funkcias en Strasbourg (10 aliĝintoj, plus nova kurso kiu komenciĝos la 4an de Marto), COLMAR (11 lernantoj) GUEBWILLER (3 kursoj en unuagrada lernejo por entute 31 lernantoj). Mankas informoj pri kurso en MULHOUSE kaj THANN. En NANCY, koresponda kurso kun 23 novaj gelernantoj.

J.P. COLNOT.

EKSKURSOJ :

Federacia Kongreso en Epinal la 26an de aprilo, renkontiĝo en La Hingrie, apud Lièpvre la 23-24ajn de majo.

Krom tiuj 2 rendezuoj, mi ŝatus, kiel la antaŭajn jarojn, ŝarigi programon de aliaj ekskursoj, piedaj aŭ aŭtomobilaj. Sed pasintjare la intereso ne ŝajnis tre vigla inter la Federacianoj ! Mi ŝatus, ke ĉiuj interesatoj konigu al mi sian intereson por la nuna jaro, kun eventuale sugestoj pri lokoj vizitindaj. La programon pri ekskursoj mi sendos al ĉiu interesiganto.

Se mi ricevos sufiĉe multajn pozitivajn respondojn, tiu programo estos preta por la Fed.Kongreso. Do, skribu multnombraj !

Résumé pour les nouveaux élèves :

Vous êtes invités à assister nombreux au Congrès Fédéral à EPINAL, et à la rencontre de La Hingrie, les 23-24 mai.

Un programme d'autres excursions est également prévu, si vous désirez profiter de ces contacts, écrivez au secrétaire fédéral.

J. P. COLNOT.

LA ESPERANTO VIVO EN...

la Strasburga Kultura Centro :

Ni kunvenas regule ĉiujn mardojn, je 20,30-22a h. La 1an kaj 3an en restoracio "Palais de la Bière" - La 2an kaj 4an en E.Sidéjò, 1, Place Mérian.

- La 1a E.Kurso finiĝis kun 6 gediplomitoj unuagradaj.
- La 2a E.Kurso komenciĝos la 4an de marto en publika Schoepflinlernejo.
- Ni restarigis E.bibliotekon en la E.sidejo kun centro da libroj.
- Nia unua kampofajro apud la E.boatejo "Rhintordu" okazos la 19an de majo. Ekskurso kaj ebla renkontiĝo kun Orientfrancaj Esperantistoj en la familia domo de La Hingrie (Lièpvre) okazos la 23/24an de majo.
- La dua kampofajro apud la E.boatejo "Rhintordu" okazos la 15an de septembro.

...

Aliĝilo al la 29a Fed.Kongreso en Epinal

Bonvolu respondi plej baldaŭ kiel eble al Fraŭlino JACQUOT-Vallon St-Antoine - 88-EPINAL

NOMO :

Antaŭnomo :

- * partoprenos la 29an kongreson en EPINAL, le 26an de aprilo
- * ne ĉeestos
- * el miaj familianoj partoprenos : la edzino kaj infano(j)
- * ni partoprenos la komunan tagmanĝon en HOTEL MODERNE
- * ne partoprenos.
- * dezirus trapasi eventuale la ekzamenon :

Mi alvenos proksimume je la _____ horo, trajne, aŭtomobile

...

- Sijnorino OEHRI prezentis, kun paroladoj, diapozitivojn pri "Balearoj" kaj "Sardinio".
Ni dankas ŝin.

F. ZIPFEL.

NANCY

Koresponda kurso : Post dissendo de 45 gazetartikoloj, ni respondis al 84 informpetoj kaj registris ĝis nun 23 gelernantojn novajn.

El la 23 pasintjaraj gelernantoj, tri pliaj finlernis la kurson (do : 7 entute). Ili estas Fino HUSS en Saverne, gvidita de Fin^o Cavadini ; Sro Schram en Sélestat kaj Fino Morlet en (92) Saint-Denis, ambaŭ gviditaj de Sro ZIPFEL. (Malfeliĉe, Sro Schram mortis subite la 15an de Januaro, li estis 23-jara). Duono el la ceteraj lernantoj daŭrigas plimalpli regule la lernadon. Kvar superaj lernantoj nun preparas sin al Kursgvidado.

J.P. COLNOT.

Nekrologio :

Sro Eugène SCHMITT.

Bonega samideano forlasis nin. Sro Eugène Schmitt mortis la dekan de februaro en sia domo en Nancy. Li estis okdeksejaraĝa.

(1) Lorenano, Sro Schmitt, post seriozaj studadoj en Nancy, sukcesis eniri en la nacian/profesoro pri matematikoj ĉe la nacia teknika lernejo en Nancy.

Tiuj, kiuj konis lin en Francujo aŭ eksterlando, scias ke li estis pioniro de Esperanto.

Je la fino de la 1a tutmonda milito (kie li estis grave vundita) li komprenis la gravecon de komuna helplingvo por permesi interkompreniĝon kaj kontribui je la universala paco.

De tiu momento, li iĝis persistega, obstinega esperantisto, li plene donis sian liberan tempon por studi tiun lingvon, laborante kun Sino Schmitt, sia edzino, ankaŭ altirita de la sama idealo. Ili estis aganta paro.

Kiu ne konis ilin ĉe la kongresoj, ofte disiĝintaj inter la Kongresanoj por pli profunde senti la penson de la gesamideanoj de diversaj originoj.

Sro Schmitt estis prezidanto (aŭ honorprezidanto) de la nancia grupo dum tridek jaroj.

Sajnas ke li neniam forestis ĉu kunvenojn, ĉu manifestadojn, kiam li estis vigla. Nur la malsano bridis lian agemon, longtempa malsano kontraŭ kiu li batalis dum dek jaroj.

Sed Esperanto ne forlasis lian koron : la tagon antaŭ lia morto, kvankam li estis preskaŭ tute paralizita, la maloftaj vortoj, kiujn li prononcis, estis esperantaj.

Bela karaktero kies kompetenteco egalas modestecon. Lia ago estas testamento por ni.

Al Sino Schmitt, al liaj infanoj, al tuta familio la gesamideanoj kondolencas kaj certigas siajn nepereemajn sentojn.

(1) superan lernejon de Saint-Cloud, kaj reveninta li iĝis B. F.

* Mi kandatigiĝas kiel komitatano

* mi ne kandidatigiĝas

* mi proponas ke la 30a kongreso okazu en :

* Pluaj sugestoj :

(Se vi ne povos ĉeesti) * Mi transdonos mian voĉon al :

aŭ * Mi transdonos mian voĉon al la Asembleo

Subskribo :

* Forstreku la netaŭgajn vortojn !

- Ni funebras pro la subita morto de Sro Roland SCHRAM el Sélestat. Tiu juna samideano (23 jara) post fervora lernado per la koresponda kurso Perez faris brillan ekzamenon kaj ricevis la diplomon "Atesto pri lernado" kun la noto "Tre bone".

Presisto, li estus estonta valora helpo al nia movado, sed lia sorto decidis alie. Li ripozu en paco.

F.Z.

Proksimaj Informiloj :

Se sufiĉe da teksto por 4 paĝoj atingos min por la 31a de majo, la proksima bulteno aperos fine de Junio.

Aliaj numeroj estas antaŭvideblaj por oktobro (se sufiĉa teksto la 15/9), kaj por decembro (teksto por la 30/11).

Antaŭdankon pro via kunlaboro !

--:--:--:--:--

Esperanto estu lingvo simpla kaj facile komprenebla !

Zamenhof skribis : "Ni povos venki nur, se ni zorgeme konservos al nia lingvo ĝian simplecon kaj facilecon". (PLENA VORTARO : p.333, kol.2.lin.10).

Por plene respekti tiun rekomendon, jen kelkaj praktikaj reguloj :

- 1/- Uzu lingvo-stilojn malkomplikan, kun frazoj kiel eble plej mallongaj ; longegaj frazoj enuigas, tedaskaj for-timigas novulojn kaj manovulojn. (Konsultu la bonan gvidilon "Ne tiel, sed ĉi tiel" !, de F. FAULHABER).
- 2/- Uzu prefere vortojn kutimajn kaj dir-manierojn famuliarajn (Esperanto estu lingvo vivanta, ne papereca !).
- 3/- evitu, en tekstoj ne-fakaj, neologismojn kaj maloftajn fak-terminojn ; ekz., oni uzu prefere "pulmo-inflamo" anst. "pneŭmonio", kaj simile ;
- 4/- uzi participojn nur tiam, kiam estas nepre necese : ekzemple, skribu "Oni scias, ke..." anst. "Estas konate, ke..." ; aŭ "Oni konstruis la domon en 1760", respektive "La domo konstruiĝis en 1760 anst. "La domo estis konstruata/konstruita en 1760".
- 5/- evitu malklarajn aŭ pezajn vort-kunmetojn (ekz. pagadmono, subapogata, allogaspekta, provovojaĝoj, pasaĝerelirejo, karbonatpurigado, malvarmummalsanoj, kaj similaj monstr-aĵoj) ; uzu prefere formojn ne miskompreneblajn, kiel ekzemple "desegnaĵoj pri infanoj", "desegnaĵoj por infanoj", "desegnaĵoj de (t.e. apartenantaj al) infanoj", kaj "desegnaĵoj fare de infanoj" anstataŭ "infan-desegnaĵoj" aŭ "infanaj des."
- 6/- uzu divid-strekon en du-radikaj kaj pli-ol-du-radikaj vort-kunmetoj, por ke ili estu pli facile ekkoneblaj ; ekzemple : bel-aspekta, kulp-atesto, fervoj-stacio, influ-sfero, kaj simile. (Vidu PLENA GRAMATIKO 1938, par. 411) ;
- 7/- évitu laŭeble la elizion dela finaĵo -o en vort-kunmetoj. Tiu regulo senteble pli-faciligas la prononcon de multaj vort-kunmetoj ; ekzemple : fiŝo-supu anst. fiŝsupo, mento-teo anst. mentteo ; besto-ĝardeno anst. bestĝardeno, kaj similaj. Krome, ĝi ebligas aŭdigi ĝusta-maniere la ĉef-kaj flank-akcenton ; ekz. : suno-varmo kiel sunavarmo (ne sunvarmo kiel ĝendarmo !) ; somero-tago (aŭ somer-tago) kiel somera-tago ne kiel som'rtago simile al asparago !). Vidu : PL. ~~VORTARO~~ GRAMATIKO Par.4 kaj 5) ;
- 8/- uzu ĝusta-maniere la divid-strekon ĉe linio-fino (por transporti parton de vorto, pro loko-manko, en la sekvantan linion), dividante la vort-kunmetojn laŭ iliaj partoj gramatikaj ; ekzemple rid-inda (ne ri-dinda !), pasport-oficejo (ne pasporto-ficejo !) k.s. (PL.GRAM. Par.412) ;
- 9/- Uzu la akuzativon nur tiam, kiam ĝi estas nepre necesa, t.e. en rektaj komplementoj kaj por indiki direkton. Tio inkluzivas eviti ne-necesan anstataŭon de certaj prepozicioj per akuzativo ; skribu prefere "memoru pri tio!" anst. "memoru tion!", aŭ "resti dum du tagoj" anst. "resti du tagojn", aŭ "kredu al mi!" (dativo) anst. "kredu min!" (akuzativo), kaj simile ;
- 10/- uzu malavare interpunkciajn signojn, por montri, kie la legantoj aŭ prelegantoj iomete haltu, por fari mallongan "spiro-paŭzon". Abundainterpunkcio konsiderinde faciligas al novuloj kaj malnovuloj klare distingi la sin-sekvajn ideojn en la frazo-partoj ; same, ĝi pli-faciligas al aŭskultantoj kompreni la sencon de frazoj prelegataj. (Komparu, ekz., la du frazojn sam-vortajn, sed malsam-sencajn: "La knabo petis ĉokoladon, manĝante pecon da pano", kaj "La knabo petis, ĉokoladon manĝante, pecon da pano" -Vidu PL.GRAM.Par.403) ;

...

11/- adoptu, en propozicioj, la naturan sin-sekvon "subjekto/verbo/komplemento" ;
ekz. "Tigro mordis krokodilon" anst. "Krokodilon mordis tigro".

12/- evitu laŭeble la substantivigon de verbo por esprimi agon ; skribu, ekzemple,
"Labori por plenumi la taskon" anst. "Labori je la plenumo de la tasko"

(Bonvolu eltondi aŭ kopii, kaj konservi sur via skribo-tablo).

Albert Lienhardt, delgito de UEA en F.- 68-MULHOUSE

Respondaj funkciuloj de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF) invitas gesam-
ideanojn partopreni al la

12-a "Eŭropa Feriosenajno en Svislando (EFS),

kiu efektiviĝos de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1970 en la ĉarma feriejo Gwatt apud
la lago de Thun. El la alloga programo nur estu menciitaj belegaj ekskursoj al la mond-
fama montarregiono Berna Oberlando kaj varioplenaj prezentadoj vesperaj. Du divers-
rangaj feriodomoj kun kvar-, tri- kaj ĉefe dulitaj ĉambroj estos je dispono kaj elstara
kuirejo zorgos por bonfarto de la gastoj. Fruatempa aliĝo estas rekomendinda, ĉar ĝis
nun la disponeblaj ĉambroj ĉiujare elvendiĝis rapide.

Esperant-geamikoj el ĉiuj landoj kaj profesioj, kiuj ŝatas pasigi je favora prezo
senzorgajn feriotagojn en vere agrabla rondo, petu senhezite detalan prospekton ĉe
la sekretario de SAEF :

Ernst Glättli, Laurstrasse 17, 5200 BRUGG (Svislando).

- COTISATIONS 1 9 7 0 -

Le trésorier de la Fédération de l'Est remercie très vivement les
70 samideanojn qui ont déjà versé leur cotisation 1970, malheureusement il reste
presque 60 retardataires ! Si, dans le carré ci-contre se trouve une petite
étoile verte, c'est pour vous rappeler que vous êtes l'un de ces retardataires
et vous inviter à vous libérer au plus tôt de cette tâche, en versant à
l'adresse ci-dessous le montant de l'une des cotisations choisies dans le tableau
paru dans le numéro 62 de "LA INFORMILO" et brièvement rappelé ci-après :

	<u>+ de 21 ans</u>	<u>- de 21 ans</u>
1/- Membre adhérent (UFE & UEA)	7,00	7,00
2/- Membre titulaire	31,00	16,00
3/- Membre individuel (avec annuaire)	54,00	27,50
4/- Membre individuel (annuaire et revue mensuelle)	77,00	50,50

(Pour les Membres de Strasbourg, ajouter 5 fr pour le groupe).

CHAPELLIER Jean (trésorier de la fédération de l'Est pour l'ESPERANTO)
109, Avenue de la Malgrange - 54-JARVILLE -

C.C.P. 399 - 75 NANCY.

